Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 23/07/2020 Kvarcentokdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo*
Google Translate *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo*
Esperanta Retradio *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153 *Roger Springer*

★★★

Kelkfoje niaj kapabloj aŭ lerninteco ne sufiĉas por nia funkcio en la socio. Tio kreas problemojn por la individuo aŭ por la socio. Kelkfoje nia lerninteco ne sufiĉas. Kaj kelkfoje eĉ nia interesiĝo ne sufiĉas. Tioj kreas problemojn. Solvi tiujn problemojn dependas de la karaktero de la individuo kaj de la helpemo de la socio.

La karaktero de la persono povas ne nur esti negativa al la bezonoj, sed povas esti ankaŭ tro postulema, tiel ke ĝi volas decidi la funkciojn de aliaj individuoj. Tio lasta okazas ne malofte, kaj kreas en la socio malfacilaĵojn, ofte gravajn. Ekzemple politikisto povas miksi sin tro en la persona vivo de aliuloj. Tiu fakto, krom la manko de sufiĉa kapablo, kreas la plej multajn kverelojn en la socio. Multaj homoj pensas, ke ili povas kaj rajtas juĝi la laboron de aliaj personoj.

La ĉi supra situacio aplikiĝas ankaŭ al familioj, al kluboj, al kompanioj, kaj al asocioj. Ne malpli en organizo kia A.E.A. Ĉiu organizo havas certajn celojn kaj tial certajn funkciojn. La plej taŭga havebla membro okupas kaj aplikas iun funkcion en la organizo. Ankaŭ en A.E.A. Sed ankaŭ en A.E.A. ekzistas la ĉi supre menciitaj problemoj, pli malpli. Malpli por trovi la taŭgajn funkciulojn, pli por eviti enmiksadon en la laborojn de la aliaj funkciuloj. Ekzemple, spertulo pri la gramatiko de la lingvo, grava funkcio, devas ne peni devigi literaturiston, verkiston, en la movado, tre grava funkcio, ŝanĝi sian stilon kaj gramatikon kiu ne komplete ĝustas sed uzatas plej kutime, kaj la literaturisto, por kiu plej gravas la stilo, devas ne peni devigi la specialiston pri gramatiko forgesi pri la gramatika perfekteco. Se ili faras tiojn, ili kreas malsanan atmosferon en la asocio. Same pri la aliaj spertuloj en sia kampo. Tiaj situacioj ekzistas pli malpli en ĉiuj asocioj, kaj ankaŭ en A.E.A. Ne estas la specialistoj kiuj devas kritiki unu la alian, sed estas la ordinaraj membroj kiuj regule kaj serioze devas ekzameni kaj juĝi kaj plibonigi la laboron de la specialistoj.

A.E.A., kaj la aliaj Esperanto-organizoj en la mondo, necese havas plurajn specialistojn, ne nur literaturiston kaj lingvistojn, sed propagandistojn kaj instruistojn kaj publikigistojn k.t.p. Kaj la multaj ordinaraj membroj aktive juĝu kaj plibonigu la specialajn laborojn en la asocio. Kaj la specialistoj atendu kaj eĉ petu la kritikojn *Marcel Leereveld .*

★★★

Ne mordu la manon, kiu nutras vin Kritiko de Ĉinujo ne helpas iujn ajn en Ĉinujo kaj ne helpas Aŭstralion sed perdigas al Aŭstralio bilionojn da dolaroj per perdo de turistoj, studentoj, merkato pri viando, hordeo, karbo, ktp

Ĉu la mondo ne havas sufiĉajn problemojn sen la uzo de mono por la tria mondmilito ?

Roger Springer

★★★

Kiun umi-vorton vi plej ŝatas?

La sufikso *um* ne havas precizan signifon, sed oni uzas ĝin por formi vortojn por kiuj la pli precizaj sufiksoj ne taŭgas. En PuzzleFoundry.com mi trovis 82 verbojn kiuj finiĝas per *umi*. Kiam mi forigis vortojn kiuj ne havas la sufikson, ekzemple *lumi* kaj *zumi*, 72 umi-vortoj restis. Simile, mi trovis 17 adjektivojn kaj ĉirkaŭ 55 substantivojn kun la sufikso *um*. Nur kvar adverbojn kun *um* mi trovis.

Claude Piron verkis mallongan artikolon pri “umi-vortoj”. Li opiniis, ke la umi-vortoj ofte havas specialan guston, kiu karigas ilin al multaj esperantistoj. Li citas la vorton *kafumi*, kiu estas sufiĉe ofta vorto en kongresoj. Ĝi estas pli ol kaftrinki, kaj elvokas atmosferon de amikeco, malstreĉiĝo, bonfarto, ktp. *Butikumi* estas pli ol viziti butikojn; ĝi estas promenadi kontente, senhaste — do pasumi — tra butikaro.

Piron citis korespondanton kiu skribis: *Mi venas al kongresoj nur por amikumi*, do, ni supozas, por renkonti geamikojn, amikiĝi kun aliaj, por sperti la amikecan etoson de kongreso. Estas malfacile, klarigi kial tiaj vortoj ne kreas problemojn pri komprenado. Oni sentas ilin same tra la mondo, laŭ Piron.

Kolombumi (1 amindume interparoli kaj interkaresi, 2 kveri – PIV)*, papiliumi* (flirti; ĉirkaŭvagi, kiel papilio), estas elvokivaj vortoj. Iuj umi-vortoj temas pri malplezuroj, ekzemple *malvarmumi* (esti trafita de malsaneto pro elmeto al malvarmo)*, stultumi, ŝtonumi*. Iuj estas praktikaj: *aerumi, akvumi, replandumi,* ktp. Politikistoj iam *pavumas, infanumas* (afekti infanecan teniĝon – Reta Vortaro))*, stultumas*... Tamen *pavumi* havas la saman signifon kiel *pavi* (1 (pavo) eletendi sian voston; 2 malmodeste paradi – PIV), do ĝi ne estas uzinda, krom se necesas eksplici, ke oni parolos ne pri pavo, sed pri iu aŭ io kiu paradas pavece.

Retumi mankas en PIV, sed oni ofte uzas ĝin en esperantaj medioj kun la signifo ‘pasigi tempon en la Interreto’. La substantivo *retumilo* estas tre ofta vorto (anstataŭ *foliumilo, TTT-legilo*). Tamen tio estas moderna difino. Benson citis la vorton *retumi* kun la signifo ‘evoluigi, labori en reto’, kie *reto* havas sian kutiman ĝeneralan signifon rilate al vojoj, televido, radio, kolegoj.

Brulumi mankas en PIV (nur *brulumo* troviĝas tie), sed Reta Vortaro difinas ĝin esti sinonimo al *inflami* (esti en stato de inflamo).

Mordumi mankas en PIV, sed ĝi aperas en Reta Vortaro, kun la signifo ‘prilabori surfacon per kaŭstika substanco por ĝin purigi, kolorigi, krei desegnaĵon, cirkviton ktp’. Tio estas unu el la teĥnikaj signifoj de *mordi*: ‘diversmaniere ataki la supraĵon de materialo, por ŝanĝi ties ecojn’ – PIV*).*

Kelkaj umi-vortoj (*retumi, kafumi)* aperis moderne, sed ĉu *umi* estas uzebla kun iu ajn radiko? Ne, vere. Iuj uzis ĝin kun la sama signifo kiel la ordinara verbo, ekzemple *provizumi* havas la saman signifon kiel *provizi,* do *provizumi* ne estas uzinda. Estas konsilinde, ne uzi umi-vorton — aŭ iu ajn um-vorton — se oni ne estas sufiĉe certa, ke ĝi estos komprenebla internacie, sed estas malfacile scii tion.

Referenco: Claude Piron, *A few notes on the evolution of Esperanto*, en Klaus Schubert,

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

ed., *Interlinguistics* No 42 of the series *Trends in Linguistics - Studies and Monographs* (Berlin, New York: Mouton de Gruyter, 1989), pp. 129-142.

Donald Rogers

★★★